

Ni alvokas al UN firme defendi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj daŭre labori por ĝia plena realigo.

La ideo de homaj rajtoj estas la plej potenca kaj kapabla rimedo por gvidi nin al realaĵo, kie ĉiuj homoj estas respektataj kaj povas realigi komunajn kaj personajn vivprojektojn. Tial ni daŭre kaj kolektive reasertas, kiel aperas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, nian firman kredon je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de homoj, “sendepende de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.”

Homaj rajtoj estas ĉiutagaj necesoj: ilia ĉeesto aŭ manko konsistigas nian ĉiutagan vivon. Kiel diris s-ro Volker Türk, Alta Komisionestro de UN por Homaj Rajtoj: "Ni devas rekuniĝi kun homaj rajtoj, rememorante, ke temas pri homoj - pri iliaj bezonoj, deziroj kaj timoj, same pri iliaj espero kaj aspiroj.”

Homaj rajtoj estas en la manĝaĵo kiun ni manĝas, en la aero kiun ni spiras, en la vortoj kiujn ni parolas, en la eblecoj kiujn ni realigas, kaj en la protektoj, kiuj tenas nin sekuraj. Ili estas la komuna grundo, kiu unuigas nin en diverseco, la fundamento de nia vivo, kaj gvidilo por decidoj koncerne nin ĉiujn.

Ni speciale atentigas pri homaj lingvaj rajtoj, ĝuste ĉar temas pri ĉiutaga afero, ekde plej intimaj konversacioj ĝis publika debato. Ni laboru kontraŭ lingva diskriminacio. Ĉiuj rajtas partopreni en lingvaj komunumoj, uzi, protekti kaj antaŭenigi siajn lingvojn. Same, ĉiuj rajtas esti plurlingvaj kaj interparoli kun pluraj lingvaj komunumoj.

Ĉiu lingvo estas kolektiva realaĵo, kaj esprimas identecojn kaj specifajn manierojn percepti kaj priskribi la realon. Tio veras por ĉiuj lingvoj, ĉu komunuma, grupa, regiona aŭ internacia. En

multlingva mondo, ni havu homajn multlingvaj rajtojn, tiel ke ni aŭdu, respektu kaj kunlaboru unu kun la aliaj en spirito de nediskriminacio.

La Universala Esperanto-Asocio instigas parolantojn kaj subtenantojn de la Internacia Lingvo Esperanto ĉirkaŭ la mondo al respekto kaj agado por homaj rajtoj, al solidareco, interkompreno kaj estimo por aliaj popoloj. Ni, homoj, komunumoj, popoloj, movadoj kaj nacioj, unuiĝu por homaj rajtoj, justeco kaj egaleco – kaj ni instigu niajn registarojn, opinigvidantojn kaj ordinarajn homojn samon fari.

La Gazetaraj Komunikoj de UEA

La Mediteranea Esperanto-Semajno 2026

okazos de la 14-a ĝis la 21-a de marto 2026, same kiel lastajn jarojn en la hotelo Miléade en Les Issambres, apud Mediteranea marbordo en suda Francio.

La semajno inkludos Esperantajn kursojn por tri grupoj kaj kompletan distran programon, kaj ekskurson por profiti la belan veteron de la Lazura Marbordo komence de la printempo.

La semajno komenciĝos sabaton la 14-an de marto je la 16:00 kaj finiĝos sabaton la 21-an de marto je la 11:00.

Kursoj estos gvidataj de elstaraj instruistoj:

kurso 1 (komencparolantoj):

Katalin KOVATS (Nederlando - Hungario)

kurso 2 (paroliga-kleriga kurso pri Esperanto-literaturo):

Pawel FISCHER-KOTOWSKI (Nederlando - Pollando)

kurso 3 (paroliga-kleriga kurso per mikronoveloj):

Maurizio GIACOMETTO (Britio - Italio)

Pli da detaloj aperas sur la retejo de Esperanto-Provence aŭ vi

povas sendi retmesaĝajn demandojn.

Estas nur limigitaj eblecoj partopreni en tiu semajno. Do indas aliĝi rapide!

Limdato por aliĝi: 7-an de marto 2026

Prezidanto: Rosy Inaudi, 915 ch. du Pas de la Mue, La Page Rose, 13170 Les Pennes Mirabeau, Francio -

provence.esperanto@laposte.net



Membroj de la E-klubo Pardubice rememoris la 15-an de decembro 2025 naskiĝdatrevenon de L. L. Zamenhof.

Popolaj proverboj en Bohemio

JANUARO

- Se januaro tre malvarmas, la tuta jaro fekundas
- Se herbo kreskas en januaro, oni atendas malbonan rikolton
- Januaro seka - marto malseka
- Se dum januaro multe pluvas kaj malmulte neĝas, la kampoj, herbejoj kaj ĝardenoj ne fekundas
- Frosto en januaro - ni ĝojas, akvo en januaro - eterne damaĝas
- Dum januaro neĝo kaj koto – dum februaro kruela frosto
- Abunda neĝo en januaro, malmulte da akvo en aprilo
- La talpoj tunelas dum januaro, la vintro finiĝas en majo.

ARTA PROGRAMO EN PRAGA KANALARO

Meze de novembro praga Muzeo de literaturo organizis interesan artan programon pri Theodor Adalbert Rosenfeld (T. R. Field), en la praga kanalaro, pli precize Malnova purigejo de poluakvo. Kiu estas T.R.Field? Kial en kanalaro?

T.R.Field, civitanome Bohdan Šumavanský (1891-1969), estis praga poeto, verkisto, kreinto de fantaziaj literaturaĵoj, kreinto de figuro de LOMIKEL, la reĝo de kloakaj kanaloj. Krome li elpensis fantazian popolon de KRHÚTOJ, por kiuj li kreis eĉ ilian (sensencan) lingvon. Por la programo venis sufiĉe multaj



homoj. En la subtera, vere malvarma laborejo de la akvopurigejo, oni legis kelkajn personajn notojn de kalendaroj de T.R.F., prezentigis muzikgrupo kantanta

siajn tekstojn kaj fine okazis boatflosado sur subtera akvotorento.

Mi estis invitita al la vespero, ĉar mi persone konis T. R. F.-on, kiun mi nomis per la familia nomo TEDA. Nia interkonatiĝo komenciĝis tiel: La edzino de T.R.F., Štěpánka Šumavanská, certe kun aŭreolo danke al sia edzo, estis praga esperantistino, amikino de mia avino Anna Rýznarová. Štěpánka kelkfoje vizitis nin en Svitavy kaj tiam mi estis invitita al Prago. Do, kiel

la ses - sepjara knabino, mi vizitis la geedzojn Šumavanský. Kun „onklino“ Štěpánka mi promenadis Pragon, vizitis kelkajn vidindaĵojn, rigardis noktan brilantan placon de Venceslao, vizitis Esperanto-klubon. Esperantlingve mi salutis la klubanojn kaj ili estis entuziasmiĝitaj pri mi.

Teda preferis restadi hejme. Tie li konatigis min kun la verkaro de T. R. F.: kun LOMIKEL, nacio de KRHÚTOJ, kun siaj pentraĵoj. Pleje plaĉis al mi liaj etaj, spritaj poemoj.

Pli poste post miaj du vizitoj ĉe Štěpánka kaj Teda, niaj kontaktoj finiĝis. Bedaŭrinde.

Nur antaŭ eble kvar jaroj informis min nia erudicia Mirek, ke T.R.F. estas – inter literaturspertuloj - konata persono, verkisto, poeto, fantaziulo. De tiam mi denove ekinteresiĝis pri li kaj ankaŭ pro tio mi ektroviĝis en la programo de la Muzeo de literaturo. Interesa afero. Leonarda Chaloupková

Forpasis Rob Moerbeek

Robert Moerbeek (naskiĝinta en Haarlem la 1-an de majo 1936) forpasis en Beverwijk la 27-an de novembro 2025.

Kun profunda malĝojo ni legis la tristan sciigon pri la forpaso de Rob Moerbek, nia kara amiko kaj tre estimata delonga kunlaboranto ĉe la eldonado de niaj monataj gazetoj Informilo kaj ĝia suplemento Antaŭen.

Honoron al lia memoro.



El la Gazetaraj Komunikoj de UEA:

Rob Moerbeek estis ekde 2011 honora membro de UEA. Ekde julio 1969 li laboris en la Centra Oficejo (CO). Li formale

emeritiĝis post 32-jara laborado la 27-an de aprilo 2001, sed neniam ĉesis labori por la Asocio: post la emeritiĝo li fariĝis konstanta volontulo. Inter liaj plej konataj taskoj estis la provlegado kaj lingva reviziado de la eldonaĵoj de la Asocio, inkluzive de la revuoj Esperanto kaj Kontakto. Krome li prizorgis la ekspedofakon de la CO, la Arkivon de UEA kaj la Bibliotekon Hector Hodler (BHH), al kiu li kontribuis ankaŭ post la transdono de BHH al la Pola Nacia Biblioteko, ĉefe per kontrolado de sendendaj novaj titoloj el Roterdamo al Varsovio. Rob estis latinisto laŭ eduko, magistro, kaj ankaŭ instruis Esperanton kiel privata docento en la Universitato de Amsterdamo dum 20 jaroj ekde 1978. Pri instruado kaj ekzamenoj li okupiĝis ankaŭ en la nederlanda movado. En la jaro 2000 la Estraro de UEA aljuĝis al li Premion Deguĉi pro lia longtempa agado por esperantistoj en financaj bezonoj kaj por handikapitoj, precipe blinduloj, laboro farita dum multaj jaroj kune kun la edzino Nora, forpasinta en 1998 kaj konata aktivulo de la blindula Esperanto-movado. Rob mem senĉese aktivis en Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) kaj ties nederlanda sekcio. Por LIBE li estis ekde 2001 Komitatano de UEA. Fervora pledanto por sana vivado, li en la lastaj jardekoj ankaŭ estis kunorganizanto de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj (TADEN). Pluraj aliaj eldonaĵoj – kiel Monato, Internacia Pedagogia Revuo (IPR), Scienca Revuo, Fen-x (de Esperanto Nederland), Esperantista Vegetarano, La Kontakto (de la nederlanda LIBE-sekcio) – ĝuis lian provlegadon. Inter lastatempaj libroj de li provlegitaj estas titoloj de la Serio Oriento-Okcidento – kiel Antologia skizo de la persa literaturo (n-ro 58) – krom la libroj de la Internacia Kongresa Universitato kaj eldonaĵoj de Unesko en Esperanto. Li ankaŭ partoprenis ĉiujn lastajn Universalajn Kongresojn.

Li konstante donacis al UEA por pluraj fondaĵoj, inter ili Fondaĵo Canuto, kaj ankaŭ estis ano de Societo Zamenhof kaj Alianco 365. En 2018 Rob ricevis la nederlandan Reĝan Ordenon de Oranje-Nassau. Rob fariĝis kavaliro de la ordeno pro siaj grandegaj meritoj por la Esperanto-movado en Nederlando kaj tutmonde. Li ankaŭ estis nelacigebla pacifisto kaj mondfederisto kaj li ankaŭ enplektiĝis en agadoj por subteno de vakcinado, al la nutradprogramoj de UN kaj al aliaj porpacaj agadoj. Li restos neforgesebla amiko, ekzemplo de leĝero kaj espero pri nia mondo. La Esperanto-movado lin honoru kaj eterne memoru. UEA kondolencas la familion kaj ĉiujn liajn amikojn, kiuj estis multaj.



INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento ANTAŬEN
 Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
 Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
 Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
 530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970
 e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
 Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
 Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky 2010
IBAN: CZ3520100000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX
 La jarabono de Informilo **22 €** (en kovertoj), aŭ **11 €** (e-mail)
 Roční předplatné Informila **400,-Kč** (v obálkách), nebo **200,-Kč** (v e-mailu)
 Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
 Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
 La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.